

LITERATURA INFORMILO

ELDONATA DE LA

ESPERANTO-FAKO

ĈE LA ELDONEJO

FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG

No. 6



Somero 1930

ZAMENHOF KIEL EDUKISTO

D-RO JOH. DIETTERLE

Kiam fariĝas nova teknika eltrovaĵo, ni kutime ne dependigas ĝian akcepton de la persona kvalito de l' eltrovinto. La kritika juĝo pri nova artaĵo, poemo, dramo, pentraĵo, kompozicio ktp. ja certe ankaŭ ne formiĝas tia-maniere, ke oni dum ĝi esploras la personecon de l' artisto. Tio estus ne ĝusta de sur pure artista vidpunkto. Kiom forte tamen la priartaja juĝo estas influata per personecaj priartistaj konsideroj, pri tio ni precipe en nia tempo povas instrui, atentante la gazetajn kritikojn pri artaĵoj. Ili estas influataj ne nur per laŭartaj konsideroj, sed ankaŭ per politikaj, konfesiaj kaj rasaj. Nek la artistoj, nek objektivaj, pure laŭarte juĝanta, kritikanto kontentiĝas pri tia stato. Sed ĝi ĉiam ekzistis, ĝi neniam — kvankam ĝi estas nerajta — povos esti tute forigata kaj ĝi en certa senco estas komprenebla, ĉar la kritikantoj estas homoj. Sed ankoraŭ pli komprenebla kaj tute rajtigita ĝi estas tie, kie iu proklamas iun ajn novan ideon aŭ iun malnovan ideon en nova formo (novaj ideoj fakte ekestas tre malmultaj!) filozofan, etikan, religian, por kiu li postulas, ke la homoj, al kiuj li proklamas ĝin, formu laŭ ĝi sian vivon — do, ĉie, kie li volas eduki la homaron. Tiam ni postulas plenrajte, ke tia ideo estu reprezentata de persono, kiu mem vivas laŭ ĝi. Se tio ne okazas, se la konduto kaj vivo de tiu, kiu volas ludi la rolon de edukisto, ne estas konforma al la proklamataj principoj, oni certe ne povas esperi, ke ili havas gravan efikon. Instruanto kaj edukanto — ne nur en la lernejo, sed ankaŭ en la vivo kaj la historio de l' homaro — povas esti nur tiu, kiu reprezentas edukistan personecon, per kiu li realigas la de li reprezentatan novan ideon, enkorpigas ĝin kaj montras ĝin viva en sia propra vivo.

Tute ne estas dubo, ke d-ro L. L. Zamenhof, la eltrovinto de Esperanto, rigardas tion tasko de sia vivo, ludi la rolon de edukisto de l' homaro, kvankam li — treege modesta homo — neniam parolis pri tio, kaj kvankam li eble mem ne plene konsciiĝis pri sia rolo. Same ne estas dubo, ke li fakte estis tia persono, kiu povas esti por siaj disĉiploj brila modelo. Se ni kontentiĝus, vidi en li nur la eltrovinton de artefarita mondhelplingva sistemo, kiaj ekzistis antaŭ kaj post Esperanto en grandega nombro, ni multe tro malalte taksus lian signifon. Oni ja povas rigardi Esperanton nur kiel praktikan aferon kaj la plej simplan kaj plej taŭgan solvon de problemo, pri kies solvo vane klopodis multaj personoj. Tiam oni ne esploros la personajn kvalitojn de Zamenhof. Sed tiam oni ankoraŭ ne fariĝas vera esperantisto en la senco de Zamenhof, malgraŭ la bulonja deklaro. Laŭ ĝi oni ja povas nomi sin esperantisto. Tamen la vorto havos nur eksteran signifon. Certe estas treege dezirinde, ke la nombro de tiaj esperantistoj, kiuj nur pro praktikaj celoj akceptas la Zamenhof-an lingvon, ĉiam kresku. Nur sur tiu vojo la Esperanto-afero venkos. Kaj se ĝi venkos, jam plej grava celo estos atingita. Sed ne tio, kion Zamenhof imagis al si kiel lastan celon de sia laboro. Por li Esperanto estis nur vojo al pli alta celo. Fakte lastmomente la de li elpensita lingvo estis nur apudaĵo. La ĉefaĵo estis por li tio, kion li nomas „interna ideo“. Ĉi tiu ideo gvidis kaj regis lin de lia juneco, dum la tagoj de la propagando de l' Hilelismo kaj Homaranismo, dum sia tuta vivo ĝis la lastaj momentoj.

Mi mem tute malkaŝe konfesas, ke mi komence apartenis al tiuj esperantistaj adeptoj, kiuj opinias, ke por Zamenhof unualinie estis grava la nova lingvo kaj ne la „interna ideo“. Estas cetere konsilinde, ke ni ĝenerale propagandu nur laŭ tiu vidpunkto, ĉar ni ne scias, ĉu niaj aŭskultantoj emas krom la praktikan flankon de Esperanto akcepti ankaŭ la aliajn ideojn de Zamenhof. Sed pli intensa studado de la Zamenhof-a verkaro ankaŭ tre intense korektis mian opinion. Certe li deziris, ke la lingvo elpensita de li — facile lernebla kaj de ĉiuj nacioj facile uzebla — servu al la plifaciligado de l' internacia interkomunikiĝo rilate komercon, sciencon, korespondadon, vojaĝojn ktp. Li ankaŭ tutkore ĝojis, kiam oni komprenis minimume tion, ke Esperanto estas eltrovaĵo, kiu helpas ŝpari tempon, monon, fortojn, bonfara agrablaĵo por la internacia vivo kaj plifaciligado por internaciaj rilatoj. Li ĝojis pri tiuj, kiuj decidis lerni kaj apliki ĝin pro la praktika profito. Sed tio, kion li avidis, estis celo parte politika, parte etika kaj ankaŭ religia. Politika — ĉar kun sia principo: „nacia lingvo por la rilatoj kun samnacionoj, unu mondhelplingvo por ĉiuj rilatoj de la diverslingvaj popoloj!“ li celis alproksimigi la popolojn kaj protekti eĉ la plej malgrandajn popolojn rilate iliajn lingvon kaj nacian vivon. Etika — ĉar li volis eduki la homojn kaj popolojn al konduto, kia rezultas el pli intima reciproka kono de l' popoloj kaj el la per si mem sekvanta reciproka respekto. Religia — ĉar li ŝatis la edukon de l' homaro en la senco de toleremo kaj homamo, kiuj estis por li la kvintesenco de ĉiu religie bazita mondkoncepto kaj kredo.

Mi jam aludis, ke ne necesas esplori la demandon pri la personaj kvalitoj de l' eltrovinto, kiam oni volas pritrakti Esperanton nur kiel lingvoteknikan modernan ilon. Sed oni ja ne povas eviti, ke oni pli intime kon-

atiĝas kun Zamenhof mem, kiam oni pli detale okupas sin pri Esperanto, ĉar tiam oni kompreneble unuoline devas studadi la verkaron de Zamenhof mem. Se iu dum tia laboro ne volas sekvi la edukajn sugestojn de Zamenhof, li tamen ĉiukaze ĝojos konatiĝi kun vere sincera kaj nekomplika karaktero. Li ankaŭ komprenos, kial ĝuste lia mondlingva sistemo trovis la plej konvinkitajn kaj entuziasmigitajn adeptojn, kaj kial ĝi venkis en la praktika vivo. Ankaŭ rilate pure eksterajn aferojn la homoj ja plej ofte decidiĝas per etikaj motivoj. Kaj tiamaniere dum nia poresperanta laboro ni fine vole-nevole estas tirataj en la propran idearon de Zamenhof. Precipe ni, la postmilitaj homoj. Ni ja lernis per la mondmilito, kaj ni ĉiuj deziras vidi savata la „kulturon de l'okcidento“. Ankaŭ sentante nacie, ni sopirdeziras, ke la venonta tempo alportu pli bonan reciprokan komprenon de l' popoloj kaj venkon de l' homara kaj mondburĝa pensado kaj de toleremo en la politika kaj religia regionoj; ili ja estas proklamataj en Germanujo jam kaj de l' filozofo Kant kaj de la klasikuloj.

Ĝis nun ne aperis kompleta kaj ĉionampleksa biografio de Zamenhof, verkita sur scienca bazo. Mi klopodis, liveri fidindan materialon por ĝi, kolektante ĉiujn originalajn verkojn de Zamenhof*). Kiam oni volas intime konatiĝi kun Zamenhof, ne sufiĉas iometa kono de la lingvo kaj de la historio de nia movado. Oni bezonas profundan studadon. Sed dum ĝi oni tre baldaŭ ekkonos, ke Zamenhof estis edukisto de tia speco, kian la homaro bezonas.

La vivo kaj laboro de Zamenhof povas esti pritraktataj de sur diversaj vidpunktoj. Verŝajne la rondo de tiuj, kiuj sufiĉe trafe povas imagi al si la signifon de l' malnovtestamentaj profetoj, hodiaŭ ne estas tre ampleksa. Do, mi kontentiĝas, nur aludi, ke en la vivo kaj karaktero de Zamenhof oni povas konstati kelkajn trajtojn, kiuj rajtigus nin, nomi lin profeto de nia tempo. Kiel la malnovaj profetoj li staras rekta kaj kuraĝa en la ĥaoso de sia tempo, kaj precipe de sia popolo. Li neniam trompiĝas per ekstera aspekto. Li klare antaŭvidas, kio devos okazi. Li klopodas forigi la malfeliĉon — kiu devas veni, se la mondo ne obeos lin — per siaj admonoj. Li scias, ke li klopodas vane kaj tamen ne laciĝas, montrante la vojojn al renovigo kaj savo, kiel la malnovaj profetoj ne laciĝis, prediki, ke oni pentofaru, kvankam la „tago de l' sinjoro“ jam staris antaŭ la pordo. Eĉ kiam la teruro de l' mondmilito jam eksplodis, li ne laciĝas, aŭdigi sian voĉon, por minimume por la estonta tempo deturni pluajn teruraĵojn.

Estas cetere ankaŭ tre interese, konstati, ke li jam en siaj unuaj broŝuroj kaj en la por ĉiam tre grava propagando-traktaĵo „Esenco kaj Estonteco de Lingvo Internacia“ tute klare antaŭvidas, kiamaniere la kontraŭuloj kontraŭargumentos en pure lingvo-teknika rilato kontraŭ la ideo de mondhelplingvo, — ke li, kvankam komence dediĉanta sin al juneca optimismo kaj trompaj esperoj, tute bone konscias, kiaj bataloj estos batalendaj, kiel oni povos kontraŭstari la kontraŭulojn kaj kiel oni fine povos atingi la celon. Kaj li

*) Vidu L. L. Zamenhof, Originala Verkaro (Antaŭparoloj — Gazetartikoloj — Traktaĵoj — Paroladoj — Leteroj — Poemoj), kolektitaj kaj ordigitaj de d-ro Joh. Dietterle. Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig, Esperanto-Fako. 1929.

ankaŭ antaŭvidas sian propran oferoplenan sorton; tion montras lia poemo „Mia Penso“, kiu tre ofte ne estas komprenata en sia plej profunda senco. —

Oni ja ne — laŭ malnova maniero — ŝtonmortigis aŭ bruligis ĉi tiun profeton. Sed tio, kion li devis travivi kaj suferi pro siaj ideoj, estis ankoraŭ pli malbona ol morto de martiro. Li ankaŭ estis martiro — dum sia tuta vivo de la plej frua juneco ĉiutage suferanta kaj turmentata, miskomprenata de sia patro kaj kelkaj de siaj familianoj, de la kunjunuloj, pli malfrue ankaŭ de multaj de siaj disĉiploj — ĉiutage ankaŭ premata per eksteraj vivozorgoj kaj malicaj atakoj. Sed ĉiam denove li superis la premadon ĝis la fino de la lasta, plej grava suferperiodo, kiu komencis la tagon, kiam li post la eksplodo de l' mondmilito devis sin savi el Parizo en sian hejmon en Polujo. Tie la delikatsenta homo — kiu jam kiel knabo nenion sopiris pli ol pacon inter la nacioj kaj konfesioj — finkonsumiĝis, lacigate per senlaca laboro kaj skuato per la teruraĵoj de l' mondmilito, tamen kuraĝe ĝis la lasta spiro proklamante siajn idealojn. —

Sed skizante la personon de Zamenhof kiel profeton kaj martiron, oni ankoraŭ tute ne sufiĉe honoras lin, sed nur prezentas nekompletan bildon.

Estas multe pli rekomendinde, starigi la demandon, ĝis kiu grado Zamenhof kiel homo en siaj vivo kaj konduto reprezentas mem la ideojn, pri kiuj li deziris, ke ili fariĝu komuna posedaĵo, kaj kiel li mem formas sian vivon laŭ siaj edukaj principoj. Nu, oni tutrajte povas diri, ke li estis edukisto, kiu per sia persona ekzemplo faras plej fortan impreson.

Pesimistoj kutime estas netaŭgaj edukistoj. Aŭdante ilin kaj konante iliajn pesimistajn principojn, oni demandas, kial ili celas ion, kial ili volas ŝanĝi aŭ plibonigi ion, kiam ili mem ja estas principe konvinkitaj pri la nesukceso kaj pri la nekontentiga rezulto de ĉiuj klopodoj plibonigi la homaron. Do, vera edukisto antaŭ ĉio devas en gaja, venkocerta optimismo mem kredi la venkon de siaj ideoj. Kaj tion faris Zamenhof, samtempe nepre ne trompante sin mem pri tio, ke jam la nura ekstera akcepto de internacia mondhelpingvo bezonus tre multe da tempo, ĉar regas antaŭjuĝoj precipe en la rondo de la t. n. scienco-fakuloj kaj ĉar regas la „vis inertiae“, la pensomalemo, kiu por ĉiam estis kaj restos la plej granda potenco en la mondo kaj ĉie svingas sian sceptron, tute egale en kia ekstera situacio troviĝas la homaro kaj la unuopaj homoj. Ni silentu pri la pli altaj celoj, kiujn celas la ideo de mondhelpingvo. La bono tamen — se forpasos eĉ jarcentoj — fine venkos tiel, ke ĝi — se forpasos eĉ novaj jarcentoj, ĝis oni formigos la vivon laŭ ĝi — estos agnoskata kiel bono. Tia estis la firma konvinko de Zamenhof. Pro tio neniu seniluziigo, eĉ ĉe personoj, kiuj devis ŝajni al li sufiĉe objektivaj, neniu atako de flanko, de kiu li neniel povis antaŭvidi ĝin, erarigis aŭ malkuraĝigis lin. Aliflanke li ĝojis kiel infano pri ĉiu, eĉ la plej malgranda, progreso. En la plej malfavoraj kondiĉoj — lia korpa organismo ja estadis malforta, li ĉiam vivadis en malbona ekonomia situacio kaj estis devigata, sen helpantoj, fari por la Esperanto-movado laborojn de simpla servisto — li pacience persistis. Jam kiel junulo li ja tute klare konsciiĝis, ke li devos oferi sian junecon, ĉiujn siajn financajn rimedojn kaj sian tutan vivon kaj ĉiutage rezigni pro siaj idealoj. Li ofte spertis — eĉ en sia plej proksima ĉirkaŭaĵo — la veron de l' diraĵo, ke

profeto ne valoras ion en sia patrolando. Tamen tio ne devojigis lin. Kun admirinde obstina energio li — rezignante kaj malsatante — batalbaraktis kontraŭ ĉiuj malfacilaĵoj. Kion signifas la vorto „pacienco“, kiun li tiom ofte alvokis al siaj malkuraĝigantaj adeptoj, tion ili povis lerni de li; kaj tion povas lerni ankoraŭ hodiaŭ tiuj — precipe la komencantoj — kiuj el la historio de l' homaro ankoraŭ ne scias, ke por ĝi ankoraŭ pli valoras, ol por la unuopa vivo, la principo: „bona afero postulas tempon!“

Al Zamenhof ankaŭ ne mankis sufiĉa kuraĝo, kiu estas bezonata por defendi novajn ideojn kontraŭ mondo rezistanta parte pro malbona volo, parte pro maldiligenteco. Ankaŭ por li ne ekzistis nura ekstera aŭtoritato. Kvankam li estis delikate ĝentila, kvankam li estis tre sinretenema kaj tre — eble ofte tro — modesta, antaŭ granda publiko eĉ timema kaj embarasita, tamen li neniam oferis eĉ nur unu el siaj principoj, se ĝi ŝajnis al li necesa, ankaŭ ne antaŭ tiuj, kiuj povis ŝajni al li pro sia financa potenco kaj pro sia ekonomia aŭ ofica pozicio precipe taŭgaj, progresigi lian aferon. Vere li ja estis tiel cedema, ke hodiaŭ multaj esperantistoj, — kiuj devas defendi lian lingvon en multe pli favoraj kondiĉoj (ĉar la ideo de mondhelplingvo hodiaŭ preskaŭ ne plu principe estas atakata serioze) — miras pri kelkaj de liaj deklaroj kaj koncesioj. Tamen ĉi tiu cedemo neniam transiris certan limon, pri kiu li zorgis tre singarde. Trans ĝin li faris neniun paŝon, nek kiam oni minacis al li, nek kiam — ankaŭ tio okazis — oni promesis al li financon rekompencan. Estas tute ne facile, sufiĉe klare kompreni la tiurilatan sintenadon de Zamenhof. Liaj kontraŭuloj tre ofte kulpigis lin pri obstinaĉeco. Sed tio estas miskompreno, ekzemple de liaj intencoj kaj opinioj rilate venontan oficialan akcepton de l' Esperanto-afero, pri kiu ankoraŭ hodiaŭ kelkaj, cetere tre celkonsciaj, esperantistoj ne vidas sufiĉe klare.

Kiom malmulte rilate ĉi tiun punkton li intencis vidi honorata sin mem kaj akceptata lian propran sistemon kun ĉiuj unuopaĵoj, kiom ofte li malaperigis sian propran personon kaj siajn proprajn dezirojn, kiom singarde li deziris restigi nur la fundamentajn principojn kaj ideojn elprovitajn per longtempa detala laboro, kiom malmulte li sciis pri aŭtora vanteco aŭ egoismo — pri tio ĉiu tre baldaŭ konvinkiĝos, trafoliumante unu de liaj verkoj, kiuj pritraktas la demandon de definitiva oficiala akcepto de Esperanto. Li neniam opiniis, ke li estas neerarpova. Ja, li estis eĉ tiel modesta, ke ni ofte hodiaŭ povas koleriĝi, ĉar li respondis eĉ al la plej supraĵaj kontraŭdiroj, tre detale ekzamenante kaj respondante ilin. Ĉiam li estis malegoista, ne nur ĉar li havigis al si mem malmulte da ripozo kaj vivoĝuo kaj ĉar li servis al malriĉuloj; ankaŭ kiel „aŭtoro“ li ne postulis financajn profitojn aŭ eksterajn honorojn. La lastajn li malakceptis por si mem kaj akceptis ilin nur, kiam li vidis en ili honorojn por la tuta esperantistaro. Nur unu aferon li celis kaj pri ĝi li fieris: servi al la homaro.

Ĉiuj, kiuj iomete konas la historion de la mondhelplingva ideo laŭ ĝia evoluo dum la kvar jardekoj post la apero de la unua Zamenhof-a broŝuro, ankaŭ scias, kiom ofte en la mondhelplingva movado oni laboris, parte facilanime troigante, parte bedaŭrinde eĉ falsigante la veron. Zamenhof ĉiam restis inter la limoj de l' perfekta vero. Neniam li parolis pri atingitaj sukcesoj alimaniere, ol skrupule notante nur la fakte atingitajn. Neniam li

batalis alimaniere, ol sincere kaj libere, klare kaj ekzakte montrante siajn planojn kaj intencojn. Bedaŭrinde oni ne povas konstati tion pri ĉiuj, kiuj samtempe okupis sin pri la mondhelplingva ideo.

Tiel Zamenhof estis ne nur idealisto, sed fakte ideala persono, ĉe kiu pensado, volado, parolado estas en plena harmonio kun lia agado, edukaj principoj en plena konkordo kun la persono de l' edukisto. En la persono de ĉi tiu viro ĉio estas simpla, klara, aminda. Li estas tute nekomplika karaktero, tuj komprenebla ankaŭ por infano, kiun ni volas instrui pri liaj pensoj, ĉu pri tiuj koncerne mondhelplingvon, ĉu pri tiuj koncerne novan ordon por la internaciaj rilatoj. Li staras antaŭ ni kiel homo, kiu devas esti komprenata de ano de ĉiu nacio, ĉiu konfesio, ĉiu klaso — kondiĉe ke oni volas esti honesta, bonvola homo — kiel persono — kaj tio estas la plej alta laŭdo por li! — kiun ĉiu devas ami. Mi nur aludu tion, ke Zamenhof ankaŭ staras antaŭ ni kiel viro, en kiu enkorpiĝis la humanisma idealo de Herder, la moderna tolerema pensado laŭ la senco de Lessing, la mondburĝa sintenado laŭ la koncepto de Goethe. Cetere ne povas esti dubo, ke Zamenhof, kvankam naskita en Polujo kaj kiel hebreo, laŭ sia tuta intelekta kulturo radikis en la grundo de la germanaj klasikuloj, kiuj celis sintezon de la antikva kaj kristana spiritoj en ilia plej perfekta formo. Kontraŭ la intenco, envicigi lin en iun ajn popolon, konfesion, klason, politikan partion, Zamenhof mem protestus tre energie. Li volis esti nur „homo“, homo, kiu sentas tion sia devo, servi al siaj kunfratoj kaj firmigi ilin en la konvinko, ke ili progresos nur, se ili vidos en la proksimulo — sen konsidero de la eksteraj cirkonstancoj, sub kiuj li naskiĝis — la homan fraton.

Skribi lian biografion eble pro tio ŝajnas malfacile, ĉar la irado de lia ekstera vivo estis tre regula; li ne „travivis“ multon en la senco, en kiu la homoj hodiaŭaj komprenas la vorton „travivi“. Despli multe li travivis interne en sia koro, kiu estis vaste malfermita al ĉio bona kaj bela, kaj kiu kapablis kunsenti la suferojn de aliaj homoj.

En ĉiuj landoj de Eŭropo oni hodiaŭ penas trovi por la lernejoj legolibroj legaĵojn, kiuj devas eduki la junularon en nealtruda, sed despli intensa, maniero por la ideo de vera „ligo de nacioj“ — legaĵojn taŭgajn por montri homojn modelajn, kiuj per propra ekzemplo montru, kiamaniere oni fariĝas bona civitano kaj samtempe bona mondburĝo. Sendube biografio de Zamenhof, verkita de lerta pedagogo, kiu enpenetris en liajn pensojn, estus tre taŭga legaĵo-materialo por tiaj legolibroj. — Mi ripetu: dum la propagando de Esperanto komence la scio pri la persono de l' eltrovinto ne ludas rolon. Esperanto estas lingvo-teknika moderna ilo, pri kies boneco kaj taŭgeco unualinie decidas la praktika uzado. Laŭ tia situacio, kiam oni volas esperantigi iun, oni komencu la propagandon. Sed ĉe multaj, kiuj pli intime volas konatiĝi kun Esperanto kaj uzas ĝin praktike por internaciaj rilatoj — ĉu vojaĝante, ĉu kongresante, ĉu korespondante — kutime okazas, ke la kontakto kun alinacianoj kvazaŭ aliformigas ilin interne kaj sentigas ilin, ke internacia lingvo enhavas popolligantan forton. La „interna ideo“ komencas influi la novajn adeptojn — ne pro la komuna lingvo (ĉar komuna lingvo per si mem ankoraŭ tute ne ligas la homojn!), sed ĉar tian reciprokan komprenon serĉas homoj de bona volo al kompreno. Sed tiam estas konsilinde

kaj ĝusta tempo, ke la Esperanto-disĉiplo okupu sin per la studado de la Zamenhof-a persono. Se li faros tion, li nun eksentos, kion tiu celis. Li venos en la manojn de edukisto, kies ideoj despli efikos, ĉar la edukisto montras al la disĉiplo la vojon irendan per sia propra ekzemplo. Kaj nun li, komence eble rezistante pro eksteraj kondiĉoj, ne plu povos rezigni al Esperanto. Kiam li travivos tempon de malkuraĝiĝo, ĉar la Esperanto-afero liaopinie ne progresas sufiĉe rapide, tiam estos neeble por li, pligrandigi la nombron de tiuj, kiuj post mallonga batalo por la nova afero forlasas ĝin, ĉar la „fina venko“ devigas ilin atendi. Rigardante la paciencon kaj celkonscion de Zamenhof, li ekkonos, kion li devas oferi por ideo, kiu pruvis sin bona, por ideo, kiu ne nur helpas ŝpari forton, tempon, monon al la moderna homaro, sed kiu ankaŭ estas de granda eduka valoro por la renovigo kaj aliformigo de la moderna mondo.

Pro tio mi konsilas al la kursestroj, kaj precipe al miaj instruisto-kolegoj, kiuj instruas Esperanton en lernejoj, skizi por la aŭskultantoj kaj lernantoj antaŭ la fino de la kurso bildon de l' granda edukisto Zamenhof; ĝi emoci-tuŝos ilin kaj kaptos iliajn korojn tiel, ke la novaj adeptoj ne forgesos, kiamaniere ĉi tiu homo dum sia tuta vivo batalis kaj luktis por siaj idealoj. Kaj tiam ankaŭ ili helpos al la venko de liaj ideoj, ne nur akklamante ilin kun baldaŭ forfluganta entuziasmo, sed persone batalante por ili kuraĝe, pacience kaj honeste.

EL LA LABOREJO DE LA ENCIKLOPEDIA VORTARO DE EUGEN WÜSTER

ALEXANDER SCHWARZ, aferkondukanto de la E. V.

Dum la lastaj tagoj de la jaro 1929 la aŭtoro kaj la eldonejo transdonis al la Esperantistaro la kvaran liverparton de la Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana. 66 paĝoj da antaŭteksto kaj 576 paĝoj da alfabeto parto sin prezentas al la uzanto; ili atingis en la alfabeto la vorton „korno“. En tiu ĉi kvara liverparto ankaŭ finiĝas la unua volumo de la verko (sur paĝo 432, ĝis fino de la litero „j“).

En la pli antaŭaj „informiloj“ pri esperantaj vortaroj la eldonejo precipe montras la Enciklopedion, kia ĝi estas, kion ĝi prezentas, kio speciale karakterizas la porvortaran laboron, donis specimenajn kolonojn de la E. V., prezentas kritikojn el la gazetaro kaj el leteroj de kompetentuloj.

Mi hodiaŭ provos skizi al la leganto de tiu ĉi „informilo“ detalojn el la „laborejo“ de la E. V. Mi ne intencas montri ĉiujn teknikajn erojn, kiuj fariĝas necesaj ĉe la verkado; tion mi eĉ ne povus, ĉar estas neeble pri-skribi ĉion, kio estas farata ĝis la lasta punkto en la prespretaj manuskriptfolioj. Tamen mi klopodos konduki la leganton sur la vojo, laŭ kiu li vidas la ĉefan parton de la ampleksa kaj tre interesa laboro.

Okaze oni min demandis en Berlin: „El kiuj verkoj Eugen Wüster ĉerpas la seriozan materialon?“ Tiam mi povis respondi, ke la aŭtoro posedas unu el la plej kompletaj kaj enhavoriĉaj bibliotekoj sur la kampo de internacia lingvo, ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri aliaj sistemoj. Ekzemple troviĝas en la biblioteko, kiu estas ordita laŭ la sistemo de la Internacia

Dekuma Klasifiko, ĉiuj zamenhof-aj verkoj ankoraŭ nun aĉetebaj en po tri ekzempleroj: unu je la dispo de la aŭtoro mem, la dua por la sekretario, la tria staras en la ĝenerala libraro. Ke ĉiuj konataj vortaroj el la sfero de la internacia lingvo, ĝeneralaj kiel fakaj, apartenas al la libraro, mi apude mencias. Ĉi tiu biblioteko estas la fonduso por la E. V., ĝi estas konstante kompletigata laŭeble: libroj kaj broŝuroj el la unua epoko de la Esperantomovado eble ankoraŭ mankantajn estas aĉetataj kiam kaj kie ajn ili estas kapteblaj. Depost kiam Eugen Wüster laboras pri kaj por la internacia lingvo, ĉiuj novaperaĵoj preskaŭ aŭtomate enviciĝas en la biblioteko. Same kiel pri libroj ankaŭ estas pri gazetoj kaj revuoj; la plej gravaj Esperantogazetoj de la mondo ekzistas en kompletaj jarserioj.

Kaj nun, leganto, atentu: ĉiuj tiuj Esperantaĵoj, ĉu malnovaj aŭ novaj, ĉu libroj, broŝuroj, reklamiloj, cirkuleroj, gazetoj aŭ revuoj estis, estas kaj estos sisteme tralegataj. Ne nur tralegataj, tralaborataj kaj substrekataj laŭ fiksitaj principoj. La plej grandan parton en la unuaj jaroj de la porvortara laboro Eugen Wüster persone tralegis, substrekis, precipe la zamenhof-aĵojn. Kiam la laboro ampleksiĝis, li altiris helpantojn. Pri siaj unuaj kunhelpantoj la aŭtoro mem parolas en la „Antaŭparolo al la unua kajero“ (pasko 1923, legu tie). Al tiuj kunhelpantoj aliĝis aliaj, kelkaj foriris, la plej multaj restis fidelaj ĝis hodiaŭ.

Kvankam ofte ŝajnas, ke la laboro por la E. V. haltas, mi povas certigi, ke ĝi neniam estas interrompata. Konstanta sekretario respektive sekretarino kontrolas la gazetojn pri novaperaĵoj, registras ĉiujn kaj kunigas ilin en listojn; tiuj listoj ĉiumonate estas transdonataj al Esperanto-librejo, kiu altiras el la tuta mondo la novaĵojn kaj sendas ilin al la sekretario. Antaŭ ol la libroj estas envicigataj en la bibliotekon, ili estas notataj (laŭ la ordo de la biblioteko mem) en listoj. Tiuj listoj de tempo al tempo iras al la „substrekistoj“, loĝantaj en Anglujo (Long, Millidge), Francujo (Grosjean-Maupin) kaj Germanujo (Bennemann, Penndorf, v. Waldowski); ili estas la ĉefaj esperantaj vortaristoj de siaj landoj. La substrekistoj signas en la listoj tiujn librojn, kiujn ili deziras legi. Poste ili ricevas la signitajn librojn, tralegas kaj substrekas ilin laŭ la jam menciitaj principoj. La libroj revenas kaj nun iras definitive en la bibliotekon.

En la sekretario iom post iom la substrekitaj en la verkoj vortoj kaj parolturnoj estas skribataj kun la klariganta kunteksto sur slipojn. Tiuj slipoj portas en la supra maldekstra angulo la gvidliterojn de la substrekitaj (nun jam eltiritaj) vortoj, en la dekstra angulo la titolon kaj paĝon de la koncerna verko. Tiam sekvas (sur la slipo) la eltirita tekstoparto, en kiu la „substrekita“ vorto estas skribita per pli grandaj literoj ol la akompana teksto. Tiel la aŭtoro, prenante slipon, tuj ekvidas, pri kiu vorto temas. Sube estas citita la nomo de la verkinto respektive tradukinto, se koncernas verkon tradukitan el alia lingvo.

Post tiu ĉi manipulado la slipoj migras laŭalfabete en la kestaron. Nuntempe ekzistas 42 slipkestoj kun po dumil slipoj. Kompreneble la nombro de la kaptitaj vortoj prilaborendaj estas pli granda ol la nombro de la unuopaj slipoj, ĉar unu slipo ofte enhavas plurajn prilaborendajn vortojn. Sur-slipigitaj nur estas vortoj kaj parolturnoj el la substrekitaj verkoj, ne ankaŭ

el la multaj vortaroj esperantaj-naciaj; ili kompreneble estas tralaborataj same zorge kiel la ceteraj verkoj, sed sen slipoj, laŭ la alfabeto sinsekvo en la vortaroj mem. La sliparo estas jene subdividita: zamenhof-aj, komunlingvaj ne-zamenhof-aj, fakaj („sferaj“) slipoj.

Pripensu, leganto, ke la aŭtoro „finis la surpaperigon mem de la vortara manuskripto jam en printempo 1921“ (komparu la antaŭparolon al la unua kajero). Plue pripensu, ke tri el la plej ampleksaj zamenhof-aj verkoj (Fabeloj de Andersen, La Biblio, la Originala Verkaro kun la leteroj) kaj multe da aliaj seriozaj verkoj eliris nur post tiu jaro (1921). Ili ĉiuj estas tralaboritaj, substrekitaj, surslipigitaj, kaj tagon post tago ni verkas novajn milojn da slipoj, kiujn la aŭtoro ankoraŭ enŝovas en la „jam komplete (en la jaro 1921) surpaperigitan manuskripton“.

Se la aŭtoro nun elprenas el la kestaro la slipojn, por prilabori la manuskripton por la kompostado, tiam komenciĝas preskaŭ tute nova prilaborado de la manuskripto. Novaj vortoj, novaj parolturnoj, intertempe trovitaj, plej ofte pli detalaj subdividoj de la jam fiksitaj alineajoj necesigas principan ŝanĝon en la manuskripto. Centoj da slipoj ankaŭ devas esti sendataj al diversaj specialistoj-fakuloj kaj scienculoj, por aŭdi ilian konsilon en dubaj kazoj; tia korespondado pri detaloj kun specialistoj kelkfoje daŭras monatojn. Multaj manuskriptfolioj tiam devas esti kopiataj kvar-, kvinfoje, antaŭ ol ili estas taŭgaj por la okulo de la kompostisto. Estas absolute neeble, klarigi la atentendajn detalojn, kontrolojn, komparojn kun la jam presitaj kaj ankoraŭ presendaj manuskriptopartoj.

La uzanto de la Enciklopedio ne vidas inter la linioj la penon, ne la multajn ofte dumnoktajn horojn, kiujn la aŭtoro kaj la kunhelpantoj dediĉas al la verko, dediĉis precipe dum la unuaj komencoj de la verko, kiam sidis tri, kvar personoj ĉirkaŭ unu tablo en ne tre granda ĉambro, ĉiam kontrolante kaj denove kompletigante, ĝis fine la manuskripto estis preta por la kompostado.

Sed antaŭ ol la manuskriptfolioj povas iri prespretaj al la eldonejo, necesas „lasta trarigardo“ de la flanko de la aŭtoro. Tiu ĉi lasta trarigardo de la unua ĝis la lasta litero de la prespreta manuskripto kvazaŭ estas „fajlado“ de la kompostpreta manuskripto, dum kiu la aŭtoro forigas la lastajn malbenajojn, egaligas, plibeligas, donas la belaspektan poluron. Samtempe kun tiu ĉi lasta trarigardo okazas zorga kontrolo de la referencovortoj en la verko, kiuj laŭeble ja devas esti fidindaj, kaj mi riskas diri, ke ili estas tiaj. —

Sekvas la kompostado. Ĝenerale oni parolas pri „presarto“, oni laŭdas la scipovon de altkvalitaj fakuloj en presejoj, se oni tenas en la manoj eksterordinare belajn presproduktaĵojn. Sed antaŭ ol ni povas presi librojn, kompostistoj devas komposti la tekston. Malfermu, leganto de ĉi tiuj linioj, unu el la liverpartoj de la E. V., trarigardu kelkajn alineajojn de iu ajn kolono, imagu, kiom multspeca estas la litermaterialo, kaj tiam klinu vian kapon ankaŭ antaŭ la kompostisto, kiu kunmetas tiun ĉi kompostaĵon.

Daŭras nelonge, kaj el la presejo alvenas la unuaj presprovaĵoj. Ok ekzemplerojn da ili postulas la aŭtoro de la eldonejo. „Kial ok?“ vi certe demandos. Jen: kvar okuloj vidas pli ol du — sed dek ses okuloj certe vidos pli ol kvar! Ok diversaj helpkorektigistoj, sendependaj unu de la

alia — po kvar ricevas la saman tekstoparton — tralegas la presprovaĵojn; krom ili kompreneble ankaŭ la aŭtoro mem (laŭ la skribita manuskripto). Ofte okazas, ke dum la legado de presprovaĵoj denove fariĝas necesa interrilatado kun specialistoj-fakuloj, postigantaj slipoj ankoraŭ devas esti enŝovataj ktp. Je la honoro de la helpkorektigistoj mi akcentas, ke ili laboras precize kaj rapide, eĉ atentigas kaj diras siajn proprajn opiniojn al la aŭtoro, kio estas utila kaj estas atente esplorata. Dank' al la tre severa okupo pri la korektigo de la teksto mi fiere diras, ke la Enciklopedia Vortaro enhavas malmulte da preseraroj, ke ĝi meritas la plej altan laŭdon tiurilatan.

Specialan laboron ankaŭ havas la helpkorektigistoj eke de la litero „k“ en la Enciklopedio. Kun la litero „k“ komenciĝas la dua volumo de la vortaro, kaj ĝi prezentas novaranĝon. (Komparu en la kvara liverparto antaŭ la komenciĝo de la litero „k“ la informon pri „La verkindikoj en la Enciklopedia Vortaro“!) En la unua volumo de la vortaro la aŭtoro citas ĉiujn vortojn, kunmetaĵojn kaj parolturnojn uzitajn de Zamenhof per ²-signo. Eke de „k“ post la ²-signo troviĝas inter rompitaĵoj ankaŭ la trovlokoj en la zamenhof-aj verkoj, kie Zamenhof ilin uzis. Tiel la uzanto de la Enciklopedio ĉiam havas la eblecon, kontroli, eĉ detale kompari, en kiu senco Zamenhof uzis la koncernan vorton aŭ kunmetaĵon. La aldono de trovlokoj precipe tial estas grava, ĉar multaj el la zamenhof-aj verkoj ekzistas nur en kelkaj ekzempleroj en la mondo. Ekzemple ekzistas laŭ Dietterle (L. L. Zamenhof, Originala Verkaro, paĝo 57) nur tri kompletaj jarserioj de la unua gazeto „La Esperantisto“ en la tuta mondo; en Germanujo unu, kiun posedas Eugen Wüster. Same estas pri multaj aliaj verkoj de Zamenhof el la unua epoko de la Esperanto-movado.

Kiom Wüster dum multaj jaroj klopodis, por komplete korekti la zamenhof-ajn tekstojn, rezultas el la jena fakto: La Originala Verkaro enhavas sen la leteroj 391 paĝojn; 357 el tiuj paĝoj, do 92%, Wüster estis kolektinta kaj prete disponiginta al la eldonejo Hirt & Sohn por la iniciatita de li (en 1926) Originala Verkaro.

Aldono de trovlokoj nur povas havi sencon, se oni plene povas fidi al la korekteco. Tiurilate estas farata ĉio ebla: la trovlokoj trifoje estas kontrolataj de diversaj helpantoj. Imagu kiom temporaba kaj interesa (?!) estas tia kontrolado de fontoj.

La eldonejo kaj la presejo verŝajne grumblus, se ili ricevus por korektigado ok diversajn presprovaĵojn; tial oni kunigas en la sekretariejo de la E. V. ĉiujn notojn el la diversaj tekstopartoj de la helpkorektigistoj sur unu, kiun laste kontrolas la aŭtoro mem.

Redonante la unuan presprovaĵon al la eldonejo, la aŭtoro postulas duan en kvar ekzempleroj. Denove okazas kontrolo de tri sendependaj revizoroj, ĝis kiam la aŭtoro havas la certecon, ke ĉio ebla estas farata, por prezenti al la Esperantistaro nepre fidindan kaj kompletan vortmaterialon. Ĉu ĝi estas fidinda, tion prijuĝas la Esperantistaro, kaj mi riskas diri, ke la juĝo estas tial, kiel meritas la verko. La sama precizeco, kiu estas nepre principo ĉe la prilaborado de la E. V., ankaŭ estas aplikata ĉe ĉiuj aliaj verkitajoj de Eugen Wüster sur la kampo de la internacia lingvo; ili atingis la nombron de okdek.

Mi ne povas fini, ne dirante ankoraŭ kelkajn vortojn pri plendoj pro la malrapida eliro de la unuopaj liverpartoj de la Enciklopedio. Kelkaj el la abonintoj de la vortaro riproĉis la aŭtoron kaj la eldonejon, ke daŭras tro longe, ĝis kiam la kompleta verko estos je la dispono de la uzantoj. Ili estas pravaj — kaj ne!

Se vi legis ĝis ĉi tie miajn liniojn, vi komprenos, ke la verkado de la E. V. estas ne komparebla kun verkado de gazeta artikolo, ankaŭ ne komparebla kun literatura verko, eĉ ne komparebla kun alispeca vortaro, ĉu ĝenerala ĉu faka. La tuta laŭsistema laboro de la aŭtoro celas prezenti nek simplan vortaron nek fakvortaron, sed sciencan fundamenton de la internacia lingvo, kiu estu bazo por ĉiuj sciencaj esploradoj, ne nur por okaza bezono de iu leganto, kiu hazarde serĉas vorton, kiun li momente ne povas trovi aŭ kompreni. Pritraktu la laboron laŭ ĉi tiu vidpunkto, kaj vi komprenos, ke ekzakta kaj fidinda laboro kiel tiu por la Enciklopedia Vortaro postulas tempon.

Ankaŭ ne volu pretervidi, ke la aŭtoro havas devojn ekonomiajn, ke li ja ne estas sole scienculo, kiu nenion alian bezonas fari ol verki la Enciklopedion!

La Esperantistaro havas kaŭzon por danki al la aŭtoro kaj la eldonejo, kiuj ambaŭ ofertas tempon kaj multan monon por kulturtasko, kiun eble nur post jarcentoj ĝuste taksos la homaro.

GVIDILO EN INFANLANDON

ARTHUR DEGEN

Estimataj gekolegoj!

Lernolibro laŭ rekta metodo. Ĉu tio ne estas kontraŭdiro en si mem? Ĉu rekta metodo ne estas eluzo de la situacio, ekkapto de la fuganta momento, profitigo de la spontaneo, esprimigo de la individueco? Ĉu en diversaj lokoj aŭ tempoj, ĉu inter diversaj lernrondoj la kursoj povas egali aŭ eĉ nur simili reciproke?

Do, ĉu libro estas ebla, kiu servu al multe da tiaj kursoj?

Lasu ni la principojn kaj serĉu ni la respondon ĉe la praktiko, ĉe la realaj faktoj!

Sinjoro pastro Ĉe, la konata praktikanto de la rekta metodo, gvidis kursojn inter nacioj, kies lingvon — aŭ lingvojn — li ne komprenis, kursojn al entuziasmaj plenkreskuloj, kursojn de kelkaj tagoj aŭ semajnoj. Li ja ne bezonis lernolibron — kvankam ankaŭ li poste verkis kompendieton. Efikis nur lia ennaskita pedagogeco kaj rezultigis fine plenan sukceson.

Kaj ni instruistoj?

Jen la diferencoj inter liaj festoj de spirita evoluigo kaj nia longjara laboro en la lernejo:

Kio estas ludo por plenkreskulo, ofte fariĝas klopodo por infano.

Entuziasmo estas afero de tagoj — por la daŭro de jaroj ĝi alprenas la nomojn fidelo, diligento, persisto.

Kaj fine: pedagogia arto estas doto de la favora naturo, kaj majstrecon ĝi ne emas tro ofte donaci.

Krom tio la lerneja Esperanto-instruo estas nur akcesoraĵo, kaj la tut-semajna laborplano lasas al la instruisto nek forton, nek tempon, por krei tiujn ĉiujarajn kursojn sen helpilo tute el si mem.

Pro tio ankaŭ la Esperanto-Asocio de Germanaj Instruistoj komisiis min, skribi mian lernolibron, enmanigi al la kolegoj — kaj ne nur al la germanaj — tiun bezonatan ilon kaj samtempe instigi, kuraĝigi ilin al la unuaj paŝoj, kiuj fine konduku al la sole celtrafa vojo — la rekta metodo.

Tiun Pentekoston la germanaj instruistoj ja havis okazon, observi ties majstron dum konversacio kun ĉekoslovakaj kaj germanaj infanoj. Nu, kio estis lia ofte admirata forto? Ĉu la metodo, la tiel nomita Ĉe-metodo? Aĥ, tiun metodon ni jam ofte aplikis, faris eĉ propagandon per instruo, kian D-ro Privat nun postulas en la lasta numero de Esperanto. Ne, tiu forto, tiu potenco kreskas el la personeco, el la karaktero de pastro Ĉe. Li rigardis al la infanoj en la koron kaj sur la buŝon, t. e. li babilis kun ili pri iliaj aferoj laŭ ilia maniero, mem fariĝante infano kun serena, gaja, bonhumora animo. Kaj jen: tiu sereneco estas lia forto!

Tian animon la homo — ankaŭ la bonvola instruisto — ja ne povas doni al si, kaj ankaŭ tiurilate helpu la nova lernolibro. Ŝajnas, ke ĝi kvazaŭ ĉerpiĝis el la koro de Ĉe. Ankaŭ ĝi gvidas en infanlandon; ankaŭ ĝi parolas kiel infano al infanoj, ankaŭ ĝi ridas kaj ŝercas, kantas, ludas kaj dancas kun ili. Kaj varmkora infanamiko, la famekonata pentristo Kutzer-Wien, aldonis siajn multkolorajn bildojn, kiuj saltigos la koron eĉ de la plej soleca malgajulo.

Do refoje: ĉu lernolibron por instruo laŭ rekta metodo? Nun prenu tiun, provu ĝin kaj respondu mem!

SPECIMENAJ PAĜOJ

Zamenhof, L. L.: Originala Verkaro. Antaŭparoloj. Gazetartikoloj. Traktaĵoj. Paroladoj. Leteroj. Poemoj. Kun 6 faksimilaĵoj kaj portreto de L. L. Zamenhof. Kolektitaj kaj ordigitaj de *d-ro Joh. Dietterle, L. K.* 1929. 605 paĝoj. Luksa tolbindaĵo: RM 15.—

II. A. Gazetartikoloj el „La Esperantisto“ 1895. — N-roj 97—100
N-ro 99. paĝ. 81¹

Al la abonantoj de la gazeto „Esperantisto“

Antaŭ kelke da tagoj estis dissendita al la abonantoj la 4-a (Aprila) numero de nia gazeto. El niaj rusaj abonantoj neniu ricevis tiun ĉi numeron. En la lastaj monatoj multaj niaj rusaj abonantoj ne ricevis tiun aŭ alian numeron; ni klopodadis, ni sendadis denove, ni havis malagrablaĵojn en granda amaso kaj ni penadis bataladi kontraŭ ĉiuj malhelpoj. Sed nun la cenzuro en Rusujo decidis tute ne enlasadi pli la „Esperantiston“ en Rusujon! Niaj amikoj scias, kun kiaj grandaj malfacilaĵoj ni jam sen tio devis batali, — kaj nun oni subite fermis al ni la tutan Rusujon, t. e. deŝiris de ni per unu fojo preskaŭ $\frac{3}{4}$ de ĉiuj niaj abonantoj! La bato estis tiel subita kaj neatendita, ke ni eĉ ne povis nin prepari al tio ĉi!

Ni kutimis jam sufiĉe al malfacilaĵoj kaj al batoj de la sorto; ni ne perdas la esperon kaj ni tute ne ĉesos laboradi kaj daŭrigadi nian aferon. Sed la neatendita bato devigas nin vole-ne-vole interrompi por kelke da monatoj la eldonadon de nia gazeto, ĝis ni tute ordigos la aferon. Niaj abonantoj volu

pardonu al ni tiun ĉi interrompon, ne dependantan de nia volo. Post 3—4 monatoj nia gazeto denove aperos — eble sub ŝanĝita formo, titolo aŭ loko de eldonado, responde al la metotaj postuloj de la cenzuro, — kaj niaj abonantoj ricevos tiam per unu fojo ĉiujn numerojn por la interrompita tempo.

Ankaŭ la eldonadon de la „Biblioteko“ ni devas interrompi, sed ankaŭ nur por mallonga tempo, ĝis ni ordigos la aferon; post 3—4 monatoj la „Biblioteko“ denove daŭrigos eliradi. Ĉiujn abonantojn de la „Biblioteko“, kiu ankoraŭ ne pagis, ni petas, ke ili volu alsendi al ni la pagon por la folioj, kiujn ili ĝis nun ricevis.

Aprilo 1895.

La redakcio de la „Esperantisto“.

N-ro 100.

Aldono

Al la artikoloj el „La Esperantisto“ mi aldonas interesan artikolon, kiu rilatas la planon de Zamenhof, jam baldaŭ post la apero de Esperanto aperigi Esperanto-gazeton en Rusujo. La tradukon kaj la noton sub la teksto afable prizorgis s-ro N. Nekrasov, Moskvo. (Komp. en ĉi tiu libro V. 62.)

¹ *Paĝo sen numero; la paperfolio estas supernombra, algluita al la gazeto-numero. La artikolo estas skribita de la „redakcio“, do, de Zamenhof.*

III. Traktaĵoj. Homaranismo. 1906. — N-roj 7—8.

Nr-o 7.

Pri la homaranismo

Respondo al P-ro Dombrovski

„Ruslanda Esperantisto“ II. 1906, n-ro 5 (Majo).

Oni devas memori, ke la homaranismo tute ne volas anstataŭigi la ekzistantajn religiojn kaj templojn per iaj aliaj, ĝi volas nur krom la ekzistantaj kaj paralele kun ili fondi ankaŭ festojn, morojn kaj templojn neŭtrale-homajn. Estas vero, ke iom post iom (eble post tre longa tempo) la festoj kaj moroj neŭtrale-homaj paligados kaj elpuŝados la morojn gentajn, kaj la malaperantaj, ĉiam malpli kaj malpli ŝatataj religioj cedos iom post iom sian lokon al unu neŭtrale-homa kaj sincere kaj senhipokrite kredata religio; sed ĉu de tio ĉi ion perdos la religia ideo?

Vin, s-ro D., pri kiu mi scias, ke vi estas homo sincere kaj profunde religia, efektive kaj kore sindona pastro de Dio, — vin mi demandas: se vi povus vin turni al tiu granda morala Forto, kiun vi nomas „Dio“ kaj demandi Lin, ĉu li preferas, ke la homoj havu multajn religiojn kaj tial malamadu sin reciproke kaj ĉiu diru, ke nur lia religio estas la vera, aŭ ke la homoj aranĝu inter si ponton, per kiu ĉiuj religioj povos iom post iom kunfandiĝi en unu religion, kaj ili konstruu templojn komunajn, en kiuj ili povos frate ellaboradi al si idealojn kaj morojn komunajn, — kion Dio respondus? Se vi estas certa, ke Li preferus la unuan, tiam batalu kontraŭ la homaranismo; sed se vi pensas, ke Li elektus la duan, tiam . . . ne batalu por ni (ĉar mi komprenas, ke kiel pastro vi ne povas tion ĉi fari, almenaŭ nun), sed almenaŭ ne batalu kontraŭ ni, ĉar, batalante kontraŭ ni, vi batalos kontraŭ la volo de Tiu, al kiu vi ĉiam sincere kaj honeste servis.

Homarano¹.

¹ *Ke la „Respondon“ al P-ro Dombrovski skribis Zamenhof, tion montras ne nur la tuta situacio, sed tion pruvas tre klare V. 291 kaj 296.*

PROVA PAĜO EL LA NOVA ESPERANTO-LERNOLIBRO
LAŬ REKTA (ĈE-)METODO

Arthur Degen, Esperanto-Lernolibro por popollernejoj. Laŭ rekta metodo. Kun multaj — ankaŭ multkoloraj — bildoj de Ernst Kutzer. Unua parto; Unua—dua lernjaro. 1930. 67 paĝoj. RM 2.—.



4. Patrino aĉetas mem.

1 veturilo verda, 2 tabulo nigra, 3 papero blanka, 4 saketo bruna, 5 vinbero blua, citrono flava, salato verda, tomato ruĝa, karoto ruĝa kaj verda, 6 stango longa, 7 rado ronda, patrino juna, jako moderna, 8 ŝtrumpo maldika, 9 ŝuo eleganta

Vendisto: Salato, verda salato! Terpomoj, novaj Malta-terpomoj! Karotoj, tomatoj, mandarenoj! Nur bona, freŝa varo!

Patrino: Bonan tagon!

Vendisto: Bonan tagon, sinjorino!

Patrino: Ho, la belaj oranĝoj!

Vendisto: Ne, sinjorino; tio estas mandarenoj.

Patrino: Ĉu la mandarenoj estas dolĉaj?

Vendisto: Jes, sukero-dolĉaj.

Patrino: Kia la salato estas?

Vendisto: Freŝa, sinjorino, tute freŝa; nur hodiaŭ el la bedo.

Patrino: Kiaj estas la karotoj?

Vendisto: Ho, bona, delikata varo!

Patrino: Sed malgranda. Kie estas la pomoj?

Vendisto: Jen en la korbo! Du funtoj por unu marko.

Patrino: Ho, belaj fruktoj! Mi aĉetas por unu marko.

En la originalo ĉi tiu bildo estas kvarkolora.

KION DIRAS LA KRITIKO?

Bennemann, Paul, L. K.: Internacia Kantaro. Kolekto de 139 popolaj kantoj el 55 landoj, 7 esperantaj kantoj, rondkantoj, kantsalutoj kaj 3 famaj koncertarioj.

Tekstaro (16a—20a milo). 1929.
101 paĝoj. Broŝurita: RM 1.50.

Muzika eldono (4a—6a milo). 1930.
154 paĝoj. Broŝurita: RM 4.50.

Esperanto (1930, Januaro): „... S-ro P. Bennemann, kiel tradukinto, kolektinto, muzikisto estas grava kaj laŭdinda. Lia kolekto liveras poezion kaj muzikon de plej diversaj landoj; ĝi ankaŭ pli intime malkaŝas ilian popolan animon... Do jam valora kaj interesa estas la tekstaro, kiun kompletigas, en aparta albumo, la melodioj por unu aŭ pluraj voĉoj, por ĥoroj, kun aŭ sen fortepiana akompanaĵo.“

Heroldo de Esperanto (1930, No. 2): „... La nova eldono enhavas 78 kantojn ne troviĝantajn en la malnova eldono. Pli multe ol antaŭe estas aranĝitaj kantoj por ĥoro aŭ por 2—6 voĉoj, ĉar en tia aranĝo oni povas ilin bone ludi ankaŭ per fortepiano.“

Casari-Scheibenreiter: Esperanto-Lehr- und Lesebuch für österreichische Hauptschulen und für die unteren Klassen der Mittelschulen. Von Prof. Dr. Anton Casari und Fachlehrer Franz Scheibenreiter. Teil II: Oberstufe. 1929. 96 Seiten. Kartoniert: RM 2.10.

Esperanto (1930, Januaro): „La dua parto, por progresintoj, de la bonega Lehr- und Lesebuch, kiun kompilis por Aŭstrujaj mezlernejoj profesoro Casari kaj fakinstruisto Scheibenreiter, estas eldonata kun kutima perfekteco de la firmo Hirt kaj filo. La ĉefa parto estas prozaĵoj pri vojaĝo tra la hejmlando de patro kaj filo; leteroj al la familianoj plivariigas la tekstojn; aliaj temas pri hejma vivo, pri fremdaj kuriozaĵoj, pri Esperanto. Versaĵoj, humoraĵoj, kaj ludoj finigas la volumon, kiun tre belaj kaj taŭge elektitaj bildoj ornamas... La priparolata libro ankaŭ pravas siaflanke la altan nivelon de la instruado kaj de la libroj uzataj por nia lingvo. Ĉar la enhavo, krom germanlingva resuma gramatiko estas nur esperanta, alilandaj lernantoj povus profiti el ĝi.“

Heroldo de Esperanto (1929, No. 48): „... La aŭtoroj kreis idealan duan parton, kaj mi bedaŭras ne nur nun povi lerni Esperanton pere de la du modelaj lernolibroj... Multaj ilustraĵoj ornamas substrekante la tekstaron.“

Sadoveanu, Mihail: Nobela peko.

El la rumana originalo tradukis kun permeso de la aŭtoro *Tiberio Morariu*. (Internacia Mondliteraturo, vol. 21.) 1929. 63 paĝoj. Kartoniata: RM 1.60.

Enhavo: Antaŭparolo. Nobela peko. En arbaro Petriŝor. La sciigantoj.

Germana Esperantisto (1930, Aprilo): „Jen — juveletoj, estas la tri pecoj! Nunepoka literaturo rumana tuŝas nin, ĝia brilo neniom suferas pro la facetoj de Esperanto-lingva prismo... El la antaŭparolo de l' tradukinto mi sciiĝas, ke la verkinto sendube estas la plej forta kaj valorplena nuntempa prozisto rumana; el la Esperanto-lingva teksto ni ekkonas, ke la tradukinto estas unu el la plej lertaj stilistoj de nia lingvo... Kiu ŝatas literaturan ĝuon, aĉetu la libreton.“

Heroldo de Esperanto (1929, Junio): „Ni konatiĝas kun novelo de la rumana prozisto Sadoveanu, la plej fekunda kulturanto de l' kampo literatura en Rumanujo. Lia verko estas tre impresa pro sia natureco. Li gvidas nin tra la vasta marĉa regiono de sia patrujo, skizante viglan vivon en rakonto drameca pri malnovepoka nobelo kaj popolanoj. La tradukinto estas bonkonata en niaj rondoj, li majstras nian lingvon kaj montris sin inda doni al ni tiun bonegan tradukon de bonega verko.“

Wüster, Eugen: Enciklopedia Vortaro Esperanta—Germana.

Kvara parto: Literoj I (iracionala) ĝis K (korno). 160 paĝoj. RM 15.—

Aŭstria Esperantisto (1930, Marto): „... Detale recenzi la enhavon de ĉi tiu giganta verko ne estas eble. Oni povas nur ĝenerale mencii, ke ĝi estas unika laŭ sia valoro kaj ke ĝi post finapero reprezentos la plej eminentan verkon de nia literaturo.“

Svenska Esperanto Tidningen (1930, Aprilo): „... Tiu verko estas eminenta trezoro de scio kaj de diligenta laboro multjara, kiu informas al ni ĉion pri ĉiu vorto, ĉu ĝi estas Zamenhova aŭ alispeca. La signifoj estas en germana lingvo, sed ŝajnas al mi, ke eĉ sen scio

de tiu lingvo oni povas ĉerpi grandan utilon el la libro. . . Mi ofte demandas la libron, kiu donas kontentigajn respondojn.“

Germana Esperantisto (1930, No. 7): El la sep partoj de ĉi tiu giganta verko nun elvenis la kvara parto, kiu enhavas la vortojn „iracionala“ ĝis „korno“. Sur paĝo 432 finiĝis per la litero ĵ la unua volumo de la verko; per la litero k komenciĝas la dua volumo. Oni permesu al mi, ripeti mian juĝon diritan en la recenzo pri la tria parto: „Mi denove akcentas la treegan valoron de la vortaro: ĝi ampleksas la tutan E.-literaturon kaj prezentas ne nur la vortojn de ĉiutaga lingvo-uzado, sed ankaŭ ĉiujn sciencajn esprimojn por teknikistoj, botanikistoj, zoologoj ktp., ne nur la radikojn, sed ankaŭ ĉiujn uzitajn kunmetaĵojn; ĝi estas la bazo por ĉiuj E.-lingvaj sciencaj laboroj. Ĉiu serioza E-isto kaj ĉiu E-unuiĝo, kies financa situacio tion permesas, montru sian dankon al la verkinto kaj al la eldoninto, aĉetante la jam aperintajn partojn.“ Ne nur la germanaj, sed la tutmondaj E-istoj

ŝuldas al la verkinto la plej koran kaj sinceran dankon pro lia intensa kaj persista laborego.

Trögel, Dr. Robert: Vom Kultur- und Bildungswert des Esperanto. Zehn erziehungswissenschaftliche Aufsätze. 1930. 77 S. Geheftet: RM 2.—

„In zehn ausgezeichneten Aufsätzen berufener Schulmänner wird die Frage vom Kultur- und Bildungswert des Esperanto behandelt. Jede Abhandlung ist ein Dokument für sich und in überzeugender Weise kommt in allen zum Ausdruck warum besonders die Volksschule nicht länger an dem ‚neuen Latein der Demokratie‘ vorübergehen kann. Eine Aufklärungs- und Werbeschrift liegt hier vor, die in die Hand eines jeden Pädagogen gehört, die aber auch von jedem Esperantist mit Gewinn für die Werbetätigkeit in Erzieherkreisen gelesen wird.“

Zamenhof, L. L.; Originala Verkaro. Antaŭparoloj. Gazetartikoloj. Traktaĵoj. Paroladoj. Leteroj. Poemoj. Kun 6 faksimilaĵoj kaj portreto de L. L. Zamenhof. Kolektitaj kaj ordigitaj de *d-ro Joh. Dietterle, L. K.* 1929. 605 paĝoj. Luksa tolbindaĵo: RM 15.—

The British Esperantist (1929, Oktobro): „. . . Ĝi estas rimarkinda kolekto da antaŭparoloj, artikoloj, traktaĵoj, paroladoj, leteroj kaj poemoj. Grandaparte la enhavo de la libro venis el fontoj malfacile konsulteblaj, kaj multo neniam antaŭe estis presita.

La volumo ĵetas lumon sur multajn fazojn de la nekonata historio de la komencaj tagoj de nia movado. Ĝi staras unika — la plej granda verko el la tuta originala Esperanta literaturo. Ĉiu biblioteko, ĉiu grupo, ĉiu serioza Esperantisto, devus klopodi, se iel ajn eble, havigi al si tiun ĉefverkon.“



Germana Esperantisto (1929, Oktobro): „. . . En ĉi tiu libro la Esperantistaro ricevis ion, kio estos por ĉiu serioza ano de la Esperantomovado la ne malhavebla helpilo por studado instrua kaj ĝuiga. Ĝi instruas tiel pri la ekstera kiel pri la interna historio de la movado, pri venkoj kaj malvenkoj, pri sukcesoj kaj malfacilaĵoj kaŭzitaĵoj ofte pli multe de amikoj ol de malamikoj: ĝi instruas pri evoluo de nia lingvo, pri reformprojektoj el la unua periodo, montrantaj pli multe la malegoistan cedemon de Z. ol lingvan saĝecon de la proponintoj; ĝi instruas pri la reala mondo, en kiu laboris kaj suferis Z. pro sia idealo, en kiu li donis modelan ekzemplon de saĝa persisto kaj prudenta propagandmaniero; ĝi instruas pri laŭfakta praktikemo de vera idealisto. Kaj la libro ĝuigas; ĝi ne distras aŭ amuzas, sed kaptas la animon, ĉar ĝi malkaŝas la laborplenan vivadon de viro, kiu estis pioniro de vere

homa kulturo, posedante kaj utiligante la fruktojn de civilizacia edukiteco laŭepoka. . . La kolekta laboro havigis al ni posedaĵon, al kiu resti parole kaj age fidela fariĝas nia devo! La libro estas monumento, pli daŭra ol ŝtono kaj fero, por Z., kiu restos la ‚Majstro‘ spite al lia kontraŭdiro!“

SCIENCAJ VERKOJ

Trögel, Robert, Vom Kultur- und Bildungswert des Esperanto. Zehn erziehungswissenschaftliche Aufsätze. 1930. 77 Seiten. Geheftet	RM 2.—	Wüster, Eugen, Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana. Leda duonbindaĵo por la Unua volumo aparte	RM 3.50
Wüster, Eugen, Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana. I-a parto. (Literoj A-Ĉ [ĉerizo]) 1923. XXIV, 136 paĝoj. Broŝurita	15.—	— Maŝinfaka Esperanto-Vortaro prielementa. (La maŝinelementoj; maŝinoj; plej gravaj esprimoj el la konstrukiado kaj teknologio.) Deutsche Ausgabe (Esperanto-Deutsch und Deutsch-Esperanto mit Zahlenverweisen). 1923. 89 paĝoj. Kartonita	2.—
— — II-a parto. (Esperantologiaj principoj A. B. Literoj Ĉ [ĉerko] -F [folio]). 1925. XVI, 144 paĝoj. Broŝurita	15.—	— Zamenhof-Radikaro kun derivaĵoj kaj fontindikoj. Prizorgita de <i>Paul Kirschke</i> . 1927. 84 paĝoj. Broŝurita	6.—
— — III-a parto (Esperantologiaj principoj C. D. E. Literoj F [folio] -I [iri]). 1926. XXVI, 134 paĝoj. Broŝurita	15.—	Zamenhof, Dr. L. L., Originala Verkaro. Antaŭparoloj. Gazetartikoloj. Traktaĵoj. Paroladoj. Leteroj. Poemoj. Kolektitaj kaj ordigitaj de <i>prof. d-ro Dietterle</i> . Kun 6 faksimilaĵoj kaj portreto de L. L. Zamenhof. 1929. 605 paĝoj. Luksa tolbindaĵo	15.—
— — IV-a parto. Literoj I [iri] -K [korno]. 1929. 160 paĝoj. Broŝurita	15.50		
— — Unua volumo. Enhavo: Antaŭparolo. Aranĝo de la vortaro. Esperantologiaj principoj (66 paĝoj). Vortaro: Literoj A-J (432 paĝoj). Leda duonbindaĵo .	50.—		

INSTRUAJ VERKOJ (LERNOLIBROJ, VORTAROJ KAJ MUZIKO)

Bennemann, Paul, Esperanto-Handwörterbuch. I. Teil: Esperanto-Deutsch. 1923. XVI. 159 S. In Dermatoidleinen gebunden	RM 4.—	unteren Klassen der Mittelschulen. Staatlich approbiert. I. Teil: Unterstufe. 1927. 64. S. II. Teil: Oberstufe. 1929. 96 S.	RM 1.50 2.10
— — II. Teil: Deutsch-Esperanto. 1926. XXIV. 455 S. In Dermatoidleinen gebunden	8.—	Degen, Arthur, Esperanto nach dem Fundamento von Dr. Zamenhof unter Auswertung des deutschen Sprachgutes. Kleines Lehrbuch auch für Selbstunterricht. 16.—20. Tausend. Vollständige Neubearbeitung. 1927. 48 S. Kartoniert	0.80
Bennemann, Paul, Internacia Kantaro. Kolekto de 139 popolaj kantoj el 55 landoj, 7 esperantaj kantoj, rondkantoj, kantsalutoj kaj 3 famaj koncertarioj. Tekstaro (16a-20 milo). 1929. 101 paĝoj. Broŝurita	1.50	— Esperanto - Lernolibro por popollernejoj. Laŭ rekta metodo. Verkita laŭ komisiono de la Esperanto-Asocio de Germanaj Instruistoj. Unua parto: Unua — dua lernjaro. Kun 42 bildoj. 1930. 67 paĝoj. Kartonita	2.—
— — Muzika eldono. (4a-6a milo). 1930. 154 paĝoj. Broŝurita	4.50	Dietterle, Joh., Esperanto: I. Sprachlehre. Systematisch geordneter Überblick über die Esperanto - Grammatik. 1925. 43 S. Kartoniert	0.90
Bennemann, Paul, Tra la mondo. Internacia legolibro. I-a parto: Por komencaĵoj. Kun multaj bildoj kaj muziknotoj. Kvara eldono. 1929. 96 paĝoj. Kartonita	1.50	II. Übungsstoff. Systematisch geordnete Übungstexte zur Esperanto-Grammatik. 1925. 38 S. Kartoniert	0.90
— — II-a parto: Por progresintoj. Kun aldono de 4 komponaĵoj. 1922. 144 paĝoj. Kartonita	2.20		
Casari-Scheibenreiter, Esperanto-Lehr- und Lesebuch für österr. Hauptschulen u. f. d.			

- Vol. 15. **Doroŝević, Vlas, Orientaj fabeloj.** El la rusa originalo tradukis *Nikolao Hohlov.* 1924. 64 paĝoj.
Enhavo: Antaŭparolo. La fabelo pri fabelo. La kalifo kaj la krimulino. Kiel de Hasan falis la pantalono. La malĝuste trafita kalkanoj. Historio de porko.
- Vol. 16. **Sienkiewicz, Henryk, Noveloj.** El la pola originalo tradukis *Lidja Zamenhof.* 1925. 64 paĝoj.
Enhavo: Henryk Sienkiewicz. Lux in tenebris lucet. La maljuna servisto. Dioklo. Estu benita (Hinda legendo). La anĝelo.
- Vol. 17. **Strindberg, August, Insulo de feliĉuloj.** El la sveda originalo tradukis *Oskar Frode.* 1926. 69 paĝoj.
- Vol. 18. **Bertrana Prudenci, Barbaraj prozaĵoj.** El la kataluna originalo tradukis *Jaume Graù Casas.* 1926. 64 paĝoj.
Enhavo: Antaŭparolo. La forlasita vojo. La kabanjoj de la karbfaristoj. La kamenoj de la gastejoj. Josafat.
- Vol. 19. **Šimunović, Dinko, Ano de l' ringludo.** El la kroata originalo tradukis *Fran Janjić.* 1926. 86 paĝoj.
- Vol. 20. **Eekhoud, Georges, Servokapabla! Marcus Tybout.** El la franca originalo tradukis *Léon Bergiers.* 1927. 71 paĝoj.
- Vol. 21. **Sadoveanu, Mihail, Nobela peko.** El la rumana originalo tradukis *Tiberio Morariu.* 1929. 63 paĝoj.
Enhavo: Antaŭparolo. Nobela peko. En arbaro Petrișor. La sciigantoj.

Luyken, H. A., Stranga Heredaĵo. RM	Raimund, Ferdinand, La Malŝparulo. RM
Romano originale verkita. 1922.	Originala sorĉfabelo en tri aktoj. El la germana lingvo tradukita de <i>Franz Zwach.</i> Kongresdramo de la XVI ^a . 1924.
320 paĝoj. Broŝurita. 5.50	97 paĝoj. Broŝurita. 2.—
— — Bindita 7.—	Steche, Dr. phil., Albert, Speisekarte, Deutsch-Esperanto. 1915.
— Pro Iŝtar. Romano el la antikva Babela historio. Originale verkita. 1924. 304 paĝoj. Bindita 7.—	40 Seiten. Geheftet —.50
Privat, D-ro Edmond, Historio de la lingvo Esperanto. Unua parto: Deveno kaj komenco 1887 ĝis 1900. 2a eldono. 1923. 74 paĝoj. Kartonita 1.60	Völkerbund. Esperanto als internationale Hilfssprache. Bericht des Generalsekretariats des Völkerbundes, angenommen von der 3. Vollversammlung des Völkerbundes. Deutsche Übersetzg. Zweite Aufl. 1924. 48 S. Geheftet —.50
— — Tole bindita 2.50	Wagnalls, Mabel, Palaco de Danĝero. (Rakonto pri Madame la Pompadour.) El la angla originalo tradukis <i>Edward S. Payson.</i> 1926. 206 paĝoj. Luksa tolbindaĵo . . 6.—
— — Dua parto: La movado 1900 ĝis 1927. 1927. 199 paĝoj. Tole bindita 6.—	Zamenhof, L. L., Originala Verkaro. Vidu sub Sciencaj Verkoj.
— Vivo de Zamenhof. Kun portreto de D-ro <i>L. L. Zamenhof.</i> 1923. 109 paĝoj. Kartonita 2.50	
— — Bindita 3.50	

LIVERKONDIĈOJ.

La livero okazas nur post antaŭa pago (en Germanujo ankaŭ kontraŭ remburso) je la prezoj validaj en la tago de la livero. Por la sendkosto oni aldonu 10% (por mendoj el Aŭstrujo kaj Germanujo 5%) de la pagota sumo, minimume 0,10 RM aŭ egalvaloron. Ev. oni postulu provizoran fakturon. Liverbileco kaj prezoŝanĝoj estas rezervataj.

La prezoj estas indikitaj en germanaj ormarkoj = RM (laŭ la bazo 1.— ormarko = $\frac{10}{42}$ USA-dolaroj = 1,25 sv. fr.). Oni pagu nur per poŝtmandato aŭ per naciaj, bonvalutaj monbiletoj en rekomenditaj leteroj. Eksterlandaj poŝtmarkoj aŭ respondkuponoj ne estas akceptataj. Germanoj uzu por siaj pagoj nian poŝtĉekkonton Leipzig No. 52372.

Loko por ĉiuj liveroj kaj pagoj estas Leipzig.

**FERDINAND HIRT & SOHN, ESPERANTO-FAKO,
LEIPZIG C 1, SALOMONSTRASSE 15.**

Presejo Breitkopf & Härtel en Leipzig

